

## & Incesta balado:

< Rekante 14 el 35 batoj por strofo, entute 490 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Cornelis Vreeswijk inspirita de Buffy Saint-Marie, per kies avino venas la originala kanto. El sveda interpretis kaj baladigis Martin Strid (2016) per melodio simila al tiu de Vreeswijk kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,5:35> (

A;Mi /MiMi MiMi MiMi MiRe DoLA LASO LA;Mi MiLa LaTi doTi LaLa LaMi MiRe Mi;Mi  
MiLa LaTi doTi LaLa MiMi MiFi So;

(#Rekantaĵe: LaTi doLa LaMi DoDo DoRe Mi;Mi LaTi doTi LaMi MiRe DoLA LASO LA)

)×14 )+

### (&Strofoj:

'1 Ma/rian mi renkontis kaj tre enamiĝis mi. ;  
Al miaj amdeziroj la respondo estis ŝi ; Ne  
spertaj pri amindumado ambaŭ estis ni.

(×: **Amo ja necesas, amo kaj amor' ; kaj  
belulinon amas mi profunde en la kor'.**)

'2 Sed kiam paĉjo vidis ŝin, li diris  
"Bedaŭrinde ; vi al ŝi ne amindumu, kvankam  
vere linda ; en ĉi tiu kazo via amo ne estu  
blinda." .....

'3 Paĉjo severe min admonis: "Kun ŝi vi ne  
estos ; Fuĝu nepre tiun damon, filo, kiel peston  
; ĉar ŝi kaj vi havas patron saman, kaj tiam  
fariĝos incesto." .....

'4 Poste mi renkontis Ludmilan, ŝi estis vere  
bela ; Kiam mi rigardis ŝin, mi sentis koron  
ŝvelan ; kaj mi ĵuris al ŝi resti ĉiam fidela. ....

'5 Ni volis fianĉiĝi sed tiam diris mia paĉj' ;  
"Mia filo, tenu fingrojn for de tiu dama plaĉ' ;  
ĉar mi ne volas vidi vin en abomena kaĉ'." .....

'6 Paĉjo diris: "Mia filo, bone min aŭskultu ;  
Se vi edzinigos ŝin malbonos la rezulto ; Se  
frato kun fratino kuŝas estas sangadulto." .....

'7 Poste Evan mi ekamis, estis ni obsedaj, ; kaj  
ne povis eviti ke fariĝis ŝi graveda ; kaj iris mi  
al ŝiaj gepatroj svaton urĝe pleda. ....

'8 Sed kiam patron mian ekvidis ŝia patrin' ;  
laŭte kriis ŝi, ĉar Eva estis mia fratin' ; por nia  
amafero venis do abrupta fin'. .....

'9 Johanan kaj Galinan mi devis lasi for ; Lizan  
kaj Birgitan por kiuj batis mia kor' ; kaj sveltan  
Petronelan adiaŭis mi en plor'. .....

'10 Ĉar paĉjo konis iliajn patrinojn kaj diris en  
konsekvenc' ; "De ŝi vi vin fortenu zorge ek  
de la komenc' ; kaj al ŝi ne edziĝu ĉar ŝi estas  
via parenc'." .....

'11 Komprenu, civitano, ke malridetis mia  
vizaĝ' ; Mi sentis min fermita en ĉiama  
fraŭleca kaĝ' ; Ĉar estis mi parenc' de ĉiu  
knabino en nia vilaĝ'.

'12 Cindriĝis mia ardo pro amora efemer' ;  
seksumo estis revo sed realo jen sufer' ; do iris  
mi al panjo kaj mi plendis pri l' mizer'. ....

'13 Panjo min aŭskultis kun granda interes' ;  
kaj sur la vangon sentis mi la varmon de ŝia  
kares' ; kaj poste min konsolis ŝi per milda  
konfes': .....

'14 "Paĉjo via fikulo estas laŭ kutimo kaj ŝajn'  
; Kaj ĉiujn tiujn knabinojn certe generis li kun  
fajn' ; sed li ne estas via patro, do edziĝu al kiu  
ajn." .....